

**Kavaliroj de la tablo ronda** (el la franca\* Tradicia popolkanto)

1. Kavaliroj de l'tablo ronda,  
Venu do vinon provu ni !                    bis  
Venu do, jes jes jes, venu do ne ne ne,  
Venu do vinon provu ni                    bis
  
2. Trinkos ni kvin aŭ ses botelojn,  
belulin' sur nia genu'                    bis  
  
Belulin, jes jes jes, belulin, ne ne ne,  
belulino sur la genu'                    bis
  
3. Se mi mortos, min enterigu  
en la kelo kun dolĉa vin                    bis  
en la kel' jes jes jes, en la kel' ne ne ne  
En la kelo kun dolĉa vin ' !                    bis
  
4. La pied' estu ĉe la muro  
Kaj la kap' kuŝu sub la kran'    bis  
kaj la kap' jes jes jes kaj la kap' ne ne ne  
kaj la kap' kuŝu sub la kran.                    bis
  
5. Sur la tombon bonvolu skribi  
« Jen la reĝ' de l'drinkista land' »                    bis  
Jen la reĝ' jes jes jes, jen la reĝ' ne ne ne  
jen la reĝ' de l'drinkista land' bis

La Kavaliroj de la Ronda Tablo estas legenda ordo en la servo de Reĝo Arturo kiun li komisiis gvidi la serĉadon de la Gralo kaj certigi la pacon de la regno. La unua skriba noto pri la legendo de la Kavaliroj de la Ronda Tablo troviĝas en la skriba Roman de Brut

**Eŭropa Himno**

muziko de Ludwig van Beethoven

Esperanta teksto de Umberto Broccatelli (3)

- 1-a str. Kantu kune amikaro, ni la ĝojon festas nur;  
nek rivero nek montaro plu landlimoj estas nun,  
Ho Eŭropo, hejmo nia, tro daŭradis la divid';  
Nun brilegu belo via, ĉiu estas via id'.  
Via flago kunfratigas homojn post milita temp',  
via leĝo nun kunigas civitanojn en konsent'.

2-a strofo (ne estas parto de la proponata civitana iniciato)[4]

De l' Malnova Kontinento, ĵus ekstaris la popol',  
gvidas ĝin tre nova sento kaj kuniga forta vol'.  
Sub la ŝildo de la juro, ni vivados en konkord',  
tio estas nia ĵuro: unu land' kaj unu sort'.  
Jen ekzemplo por la mondo, jen direkto, jen la voj':  
tuthomara granda rondo, en la paco, en la ĝoj'.

**Vivu la stel'**      teksto de Agnes B. Deans    tradicia usona melodio

Plenigu la glason, ho ĉiu bonul' ,  
Vivu la verda stel' !  
Kaj kantu la homoj en ĉiu angul' ,  
Vivu la verda stel' !

Refreno,

Ho, vivu la, vivu la, vivu la stel' ,  
vivu la, vivu la, vivu la stel' ,  
vivu la stel', vivu la stel' ,  
vivu la verda stel' !

1.    Plenigu la glason kaj tostu kun ni !  
      Vivu la verda stel' !  
      La lingvo kreita por ĉiu naci' ,  
      Vivu la verda stel' !

Refreno

2.    Per voĉoj de nia kunbatalantar'  
      Vivu la verda stel' !  
      Resonu la voko sur tero kaj mar' ,  
      Vivu la verda stel' !

Refreno

